Krom la monda ekonomia merkatordigado, la internaciaj problemoj nuntempe estas 'globalaj' (tutmondaj, tute ĝeneralaj) kaj minacadas la tutan homaron, kiel ekzemple la eksplodeca kreskado de la monda loĝantaro, la plivarmigado de la klimato, la ozontruo. Tiaj problemoj povas esti subigitaj nur pere de komunŝtata penado. (Fonto: *Main Post* n-ro 85, 1999-04-14, p. 14)

**Pliiĝas la kvoto de HIV-infektitaj virinoj**

En Germanio inter 3000 kaj 4000 personoj infektas sin jare per la HIV-viruso. Entute ĉirkaŭ 50,000 HIV-pozitivaj homoj troviĝas en la Federacia Respubliko. Ĉiam pli da virinoj infektiĝas kun la aidosa viruso: en Germanio ĉiu kvina HIV-infektito estas ina. "Dum la pasintaj dek jaroj kreskis la kvoto ĉe virinoj inter la infektitaj personoj de 12 al 20 elcentoj", diris la kuracisto *Thomas Grubert* dum Aidosa Simpozio en Munĥeno je la 17a de aprilo 1999.

Ankaŭ mondvaste la nombro de infektitaj virinoj kreskas pli rapide ol tiu de viroj. La majorio de la virinoj infektiĝas per la viruso pro heteroseksaj interrilatoj. (Fonto: *dpa*)

**Hundoj subtenas fizikan viglecon**

Laŭ Usona esplorstudo kun iamaj infarktpacientoj, posedantoj de hundoj pli longe vivas post korinfarkto ol senhundaj samsortanoj. Post unujara observado vivis ankoraŭ 94% de la hundposendantoj kontraŭ nur 69% de la senhundaj pacientoj. Evidente la deviga ĉiutaga promenado kun la kvarpiedulo donas novajn impulsojn al la korsanga cirkuladsistemo. (Fonto: *Werra Rundschau*, 1997-09-21, p.22)

**Floragoĉi**

Japanaj hobiĝardenistoj baldaŭ povas komuniki kun siaj potplantoj ankaŭ elektronike. Aparato nomata *'Plantone'* mezuras la elektrajn impulsojn de la plantoj helpe de malgrandaj sensoroj, kiuj estas alfiksitaj al folioj kaj enmetitaj en la grundon. Pere de lumsignala flagretado kaj sona pepetado ĝi informas pri tio, ĉu la geranio suferas aŭ ĉu la guma figarbeto bonfartas. La 'digita florpsikiatro' kiu aspektas kiel ovo en ovingo, venis sur la merkaton meze de 1999 je prezo de ĉirkaŭ EUR 50, informis reprezentanto de la firmao *EPOCH* en Tokio. Por gajigi malfeliĉajn florojn tamen necesas iom da komunikada laboro. La firmao rekomendas afablan interparolon kun la planto aŭ permanan karesadon de la folioj. (Fonto: *dpa*)

**Lumo ĝustigas la internan horloĝon**

Kiel funkcias la 'interna horloĝo' ĉe homo kaj besto estas ankoraŭ nekonate. Brita / Hispana biologteamo nun malkovris, ke evidente la



sunleviĝo ĝustigas la internan tempomezurilon*. La sciencistoj ekzamenis musojn al kiuj mankis gravaj vidreceptoroj. Malgraŭ tiu handikapo la nivelo de ilia ritmohormono melatonino malaltiĝis ĉiam tiam, kiam heliĝis. La biologoj nun konjektas, ke en la ronĝulaj okuloj estas kaŝita aldona lumsenso, kiu regulas la 'internan horloĝon'. Nederlanda/Japana teamo trovis la lumsensivajn molekulojn nomataj kriptoĥromo 1 kaj 2**. (Fontoj: **Science* Vol.284, p.502,505), ** *Nature* Vol.398, p.627)

**Paraŝuto por aviadiloj**

Ne nur la pasaĝeroj sed la tuta flugmaŝino estonte paraŝute terenŝvebos senriske. Usonaj inĝenieroj prezentis tiuspecan paraŝuton por malgrandaj motoraviadiloj, kiuj dum la alteriĝfluga manovro facile malstabiliĝas. La paraŝuto troviĝas en la malantaŭa parto de la flugmaŝino. Kiam ekfunkciigita (per raketo), ĝi bremsas la falon al 28 km/h. Almenaŭ la fuzelaĝo kaj la pasaĝeroj survivos la surgrundan frapiĝon, diras la teĥnikistoj. En Usono la savparaŝuto jam estas koncesiita. (Fonto: *Die Zeit* n-ro 16, 1999-04-14,p.43)

**Televidado klerigas**

Ke primalsanulejaj televidserioj ne nur distras sed ankaŭ klerigas, tion pruvis du Britaj studoj*. Post elsendado de la BBC-serio *Casualty* (Perakcidentaj Viktimoj), en kiu viro volis memmortigi sin pere de paracetamol-tablojdoj, kuracistoj enkete pridemandis elektatajn televidspektantojn. Rezulto: tiaj personoj estis duoble spertaj pri la danĝeroj de trodozo de la kontraŭdoloraj tablojdoj ol nespektantoj. Tamen, en la semajno post la elsendo la nombro de memmortigaj provoj pere de paracetamolo plialtiĝis je 17%. (Fonto: *Brit.Med.Jl.* Vol. 318, p.972, 978)

**Soldatoj gardadas palinurojn**

Sennombraj langustoj (pli bone konata ol la supre citita zoologia faktermino) fuĝis al Sudafrika strando pro algopesto. La registaro nun ordonis soldatojn kiel ŝirmilon kontraŭ frandemuloj. Ĉirkaŭ 100 tunoj da tiaj krustuloj kvazaŭ inundis la strandon de *Elandsbaai*, 250 kilometrojn norde de Kaburbo, ĉar pro la vetercirkonstancoj certa ruĝa algospecio ege plimultiĝis kaj konsidere reduktis la oksigenenhavon de la marakvo.

Kiel informis la publikaj instancoj, ĉirkaŭ 70% de la palinuroj survivis la algopeston. Oni nun estos transportantaj ilin per ŝarĝaŭtomobiloj al algolibera strando. Polico kaj armeo starigis barikadojn por deteni la loĝantaron. Dum simila fenomeno antaŭ du jaroj, miloj da Sudafrikanoj rapidegis al la strando de *Elandsbaai* por havigi al si langustojn por la hejma kuirpoto. (Fonto: AP)